

kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson, en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo. Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e “Bona Espero” (1984). Jam en 1980 la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. En 1995 li cetere iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”, de BBC. Li estas membro de UEA ekde 1961 kaj estis komitatano kaj vicprezidanto de UEA (! 1989-92). Li kontribuis al la establo de Fondumo Zamenhof kaj estis ĝia unua prezidanto. En 2003 aperis lia libro *La Zamenhof-strato*, pri interparoloj kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, sekve tradukita en multajn lingvojn. En 2005 li estis elektita Honora Membro de UEA kaj ricevis la unuan premion de la Fondaĵo Grabowski pro siaj esperantlingvaj filmoj kaj la verko *La Zamenhof-strato*.

Dobrzyński estas elstara ĵurnalisto kaj poligloto, ĝis nun – 85-jaraĝa – tre aktiva sur diversaj kampoj rilataj al Esperanto, internacia kunlaborado kaj ĵurnalismo. En interkonsento kun Bjalistoka Esperanto-Societo estis decidite, ke taŭga okazo por enmanigi la medalon al Dobrzyński estos la [23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj](#). La solenaĵo okazis la 10-an de decembro en Bjalistoko kaj la medalon transdonos la vojevodo (provincestro) de Podlaĥia Provinco, S-ro Bohdan Paszkowski. UEA gratulas al Dobrzyński pro la meritoplena honorigo kaj invitis ĉiujn partopreni en la evento, ĉeeste aŭ rete.

Gazkom de UEA

ILEI planas antaŭen – kunlaboro en Meza Eŭropo

LABORPLANO POR ILEI 2022-2023

- Retaj kursoj pri Esperanto en ĉiu eŭropa lando en la landaj lingvoj
- Informi pri Esperanto EU-instancojn kaj popolojn kaj verki tiucelajn informilojn
- Labori por ke la ŝtatoj deklaru Esperanton nacia kultura heredaĵo
- Mezeŭropa Regiona Kunlaboro
- Subteni la revivigajn klopodojn restarigi LA en [Makedonio Norda](#), [Islando](#) kaj por starigi labor-grupojn en [Malto](#) kaj [Kipro](#).
- Esplori la vivipovon de la LA en [Bosnio-Hercegovino](#), [Irlando](#) kaj [Grekujo](#).
- Analizi la rimedojn en [Belorusio](#), [Moldavio](#) cele al starigo de funkciantaj asocioj.
- Esplori la eblojn por refortigo aŭ restarigo de LA en [Estonio](#) kaj [Portugalio](#).
- Fronti la akutan bezonon pri generacia rejunigo tra Eŭropo

Vi vidas la kvaran punkton:

- Mezeŭropa Regiona Kunlaboro
al kiu Renato aparte turnas nian atenton por kunlaboro. Mi tie aldonus ankaŭ
- Balkana Regiona Kunlaboro

kiu specife interesas nin. Kion ni povas iniciati kaj fari tiutere? Kian helpon ni povus peti de la Eŭropa Komisiono? Kiujn kontaktojn kaj jamajn kunlaborojn aŭ kunlaborideojn ni havas en la najbaraj kaj ĉirkaŭaj landoj ?

Mi proponas ke :

1. La Estraro de SEL (Serbia Esperanto-Ligo) pridiskutu la temon kaj fiksu siajn proponojn;
2. Ĉi tiu temo estu traktata dum la venonta retkunveno de SEL komence de januaro;
3. Pripensindas retkunveno kun reprezentantoj de najbaraj kaj ĉirkaŭaj landoj kiujn ni povas atingi nun.

Kelkaj komunaj agadoj, kiujn mi povus imagi nun:

1. Komunaj retkursoj por progresantoj (por krei internacian kaj paroligan etoson por la kursanoj)
2. Metodika retinstituto (reta metodika seminario) por E-instruantoj kaj instruemuloj) - en la nunaj kursoj de SEL mi vidas kelkajn talentulojn kiuj povus kapabliĝi por mem instrui la lingvon)
3. Reta versio de DESKF (Danubregiona Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo) inkluziva por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj interesatoj;

Radojica Petroviĉ, Estrarano de ILEI

Brazila Kolekto – varia propono

La **Bando Merlin** furoris en la 90aj kaj 2000aj jaroj. Ĝiaj junaj anoj estas tre kompetentaj en rokmuziko kaj kun apogo de bonaj profesiuloj produktis du albumojn kiuj firme instaliĝis en la historio de la brazila esperanta movado.

Kaj unu el la komponaĵoj de la bando, *Estas la leĝo*, verkita de **Emmanuel de Souza Lima** k **Markone Froes** (la ĉefkantisto), aperis en **Brazila Kolekto** ĉi-semajne, kun video kaj akordoj por gitaro.

Alia novaĵo en la retejo estas plia kanto de **Erasmus Carlos** kaj **Roberto Carlos**, *Sciu vivi bone sur Ter'*, tradukita de **Vitor Mendes**.

Kaj **James Rezende Piton** tradukis kanton de **Marisa Monte** k **Arnaldo Antunes**, originale *Ainda bem*.

Medicinistoj kontrubuas per plia lingvo

Dank' al la senlaca laboro de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo kaj internacia helpantaro nun pretas versio de la trilingva tradukhelpilo kun la portugala lingvo. Ĝi estis kreita surbaze de la libro „Ärztlicher Dolmetscher“ („Kuracista Interpretisto“) fare de la d-roj Hoyer kaj celas apogi la medicinan prizorgon de ukrainaj rifuĝintoj uzante nian pontolingvon. Ĉiuj jam pretaj versioj estas kaj ĉiuj venontaj estos elŝuteblaj de nia retpaĝaro: <http://umea.fontoj.net/projektoj/> . Kompreneble estas interese aŭdi de vi, ĉu iu jam havas praktikajn spertojn kun la uzo de la tradukhelpiloj.

Christoph Klawe, prezidanto de UMEA

Stipendio nord-irlanda

Bonvolu disvastigi ĉi tiun laboranoncon ĉe viaj brilaj studentoj. Temas pri financita stipendio por doktoriĝo pri lingvo- politiko ĉe Universitato de Ulstero, Belfasto

<https://www.ulster.ac.uk/doctoralcollege/find-a-phd/1457268>

Limdato por kandidatiĝi. **Vendredo la 27-a februaro 2023**

Michele Gazzola, Ulster University; www.michelegazzola.co

Kurso lerneja en Slovenio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Elementa lernejo Anton Ukmar Koper

Gvidantonomo: Peter Grbec

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: Koper, Slovenio

Aldoninto: peterg

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27494>

Ondoj da historio

Okaze de la 163-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, ni proponas (re)legi lian koncizan biografion, verkitan de Aleksander Korĵenkov, aŭtoro de la populara libro "Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof" (2009, 2-a eld. 2011).

Legu ĝin en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto

<https://sezonoj.ru/2021/12/zamenhof-14/>

===== vortoj: 1120 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.